Palaco Nymphenburg

Panoramo de Nimfenburga Palaco de antaŭe

Panoramo de Nimfenburga Palaco de la parko

Nymphenburg [nimfenburg] estas la iama somera palaco de bavaria Wittelsbach-dinastio, apud Munkeno. La malfrubarokan konstruaĵon ekkonstruigis en 1664 la princo-elektisto Ferdinando Maria. Oni pligrandigis la palacon dum regado de Maksimiliano la 3-a Jozefo (1745–77). La faman parkon planis en 1701 Carbonet, instruato de la Le Nôtre, kiu kreis la parkon de Versailles.

En la parko troviĝas barokaj pavilonoj inter ili tiu de Pagodenburg (1716–19), Badenburg (1718–21) kaj Amalienburg (1734–39), kiu lasta havas belegajn internajn ornamaĵojn.

En la palaco funkcias i.a. la porcelana manufakturo de Nymphenburg.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Palaco_Nymphenburg&oldid=6705414"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:21, 31 aŭg. 2019.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.